# STARTO

OFICIALA ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO

Dua jaro 5-a numero septembro-oktobro 1969

## ZE ZASEDÁNÍ ÚV ČESKÉHO ESPERANTSKÉHO SVAZU V PRAZE

Zasedání pléna ÚV ČES ve dnech 11. - 12. října se zúčastnili členové ústředního výboru a ústřední revizní komise. Předseda ČES Josef Vítek seznámil přítomné s činností svazu za období uplynulé od ustavujícího sjezdu v Brně a vzpomenul zesnulé pracovníky hnutí J. Šustra, A. V. Zedníka a H. Steinera.

Předseda ČES přečetl též dopis ZE SSR, v němž představitelé slovenských esperantistů přijímají návrh na vytvoření federálního orgánu esperantského hnutí. Jednomyslně byli schváleni zástupci ČES v novém orgánu: J. Vítek, D. Kočvara a P. Polnický.

Byla projednávána možnost členství v UEA, která je závislá na souhlasu MZV a na získání devizových prostředků k zaplacení členských příspěvků. Pro příští rok byla již podána žádost o poskytnutí dotace z prostředků ministerstva kultury.

Zprávu o účasti oficiální delegace ČES na 54. světovém kongresu v Helsinkách podal ing. F. Sviták. Informoval plénum také o průběhu a obsahu schůzky představitelů socialistických zemí, která se uskutečnila během kongresu.

Dále se výbor zabýval otázkami ediční činnosti. V plánu je několik akcí včetně vydání učebnice a slovníku. Poslední je však závislé na možnostech Pedagogického nakladatelství. Jako příloha i separát časopisu PACO mají vyjít v listopadu Apokryfy K. Čapka v překladu J. Vondrouška. K tomuto vydání bylo rozhodnuto vypsat otevření edičního fondu. Počítá se s nákladem 3 000 výtisků. Naléhavá je nadále otázka tištění svazového časopisu STARTO, která bude v nejbližší době znovu projednána předsednictvem.

Výbor ČES jednal dále o účasti členů svazu na příštím světovém kongresu ve Vídni. Vzhledem k posledním opatřením vlády zůstává tato otázka ještě otevřená. Do oficiální delegace byli z deseti navržených kandidátů vybráni a jmenováni D. Kočvara a J. Kořínek a jako náhradník J. Vondroušek. Delegátem na konferenci učitelů v Jugoslávii byl jmenován RNDr. V. Novobilský.

Ústřední výbor schválil tyto sekce ČES: Sekci mládeže, Sekci katolických esperantistů, Sekci křesťanských esperantistů a Sekci železničářů. Další sekce budou schváleny po předložení potřebných materiálů.

Pokud jde o přijímání členských příspěvků na rok 1969, výbor se usnesl ponechat tuto možnost na rozhodnutí jednotlivců. Termín pro zaplacení členských příspěvků na rok 1970 byl stanoven na 31. březen 1970.

Jedním důležitých bodů jednání byla otázka politické angažovanosti svazu. Členství v Národní frontě má být co nejdříve řešeno návštěvou u představitelů NF ČSR. ÚV konstatoval, že programové prohlášení přijaté ustavujícím sjezdem v Brně je plně v souladu se současným děním. ÚV zaujal stanovisko k prohlášení ČSEV a sekce MEM ČSEV z března t. r. Toto prohlášení nepřejímají a neztotožňují se s ním.

Výhledově byla projednána možnost pořádání světového kongresu v roce 1973 v Praze s podáním předběžné přihlášky.

Do funkce hlavního delegáta UEA pro Československo byl jednohlasně navržen ing. F. Sviták.

=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=

## K a r m e m o r a   h o m o

Oni diras, ke pri la forpasinto nur bonintence indas paroli. Se oni devus paroli pri Jaroslav Šustr, kiu antaŭnelonge forlasis nin, oni alie eĉ ne povus.

Kiam mi antaŭ dek tri jaroj venis por studi en Praha, samideano Šustr estis verŝajne la unua homo, almenaŭ el inter la esperantistoj, kun kiu mi kontaktiĝis. En lia biblioteko - tiam ankoraŭ en la Dlouhá strato - mi trovis ĉion, kion nova adepto de Esperanto povis bezoni. Dum sabataj posttagmezoj okazadis tie miaj ravaj rendevuoj kun la literaturo kaj historio de la internacia lingvo. La posedanto lasis min foliumi en la libraro kaj mi danke reciprokis per okaza helpo, restante daŭra leganto. Afabla bibliotekisto imponis al mi per siaj barorompaj energio kaj obstino, plaĉis al mi lia bela kaj modela elparolo Esperanta. Kaj li havis ŝanplenon da kompreno por ĉiu. Krome, li estis la plej branda laboristo de nia movado, kiu mi iam konis...

Unu detalo eble karakterizas ankaŭ lian sintenon al homoj, kiuj forpasinte, postlasas al ni ardan mesaĝon de sia koro; ĉe tiaj okazoj li kutimis uzi la vorton "karmemora". Nome tiun vorton mi ŝatus rememori, kiam li ne plu estas inter ni.

O. Kníchal

Alia letero venis de la konata Esperanto-eldonisto Juan Régulo Pérez el Kanariaj Insuloj:

Karaj gesamideanoj,

mi vin dankas pro la sendo de "Starto" 4/69, unua kajero de via gazeto, kiun mi vidas, esperεble la cirkonstancoj baldaŭ permesos al vi presi vian gazeton, ĉar presita gazeto ĉiam disradias pli da forto kaj optimismo. Sed en viaj cirkonstancoj, mi estas aparte feliĉa povi vin gratuli pro via starto post la granda silento.

Dolore min frapis la sciigo pri la morto de mia bona amiko Jaroslav Šustr, kun kiu mi korespondis multajn jarojn, poste kunestis en Prago (1966) kaj fine mi lin ĉirkaŭbrakis en Madrido. Pacon al lia cindro! Kaj al la ĉeĥa esperantistaro mi sendas, per vi, mian sinceran kondolencon pro tiel dolora perdo. Sed homoj kiel Šustr neniam tute mortas: ili daŭrigas sian kunlaboradon per siaj verkoj, kaj Šustr levis al si nedetrueblan monumenton per la kunstarigo kaj trifoja savo de via biblioteko. S-ro Ota Ginz aranĝis, ke li ricevu du ekzemplerojn de ĉiuj miaj titoloj; espereble ni trovos vojon por daŭrigi tiun servon.

Kun refoja danko, simpatie via

Juan Régulo

- - - - -

Konekse kun la morto de s-ano Jaroslav Šustr atingis nin la letero de la prezidanto de UEA. Prof. d-ro Ivo Lapenna skribas:

Estimataj kaj karaj Geamikoj,

en la nomo de UEA kaj en mia persona mi esprimas al vi, al la Klubo de Praha kaj al la tuta Esperantistaro de via lando la plej profundan kondolencon pro tiu granda perdo. Samtempe mi petas transdoni nian kondolencon kaj esprimon de simpatio al la familio de la nobla forpasinto.

La nomo de Jaroslav Šustr restos en daŭra rememoro de ĉiuj, kiuj havis la okazon lin koni, kaj sendube estos ĉiam aprezata pro la granda kaj sindona laboro, kiun li faris por progresigi la Internacian Lingvon.

Kun estimo kaj koraj salutoj,

sincere via

Ivo Lapenna

- - - - -

Kondolencon ni ricevis ankaŭ de la estraro de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio:

En la nomo de IFEF-estraro mi kondolencas pro la perdo de via neforgesebla honora membro Jaroslav Šustr. Dankam mi ne plu havis la honoron konatiĝi kun li, mi tamen aŭdis pri li tiom pozitivan opinion, ke mi povas imagi, kion signifas lia forpaso por la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio. Tiaj homoj ĉiam tro frue forlasas nin.

Ni funebras kun vi

Elfriede Kruse

## T A J E M N Í Č E, N A S L O V Í Č K O !

O PŘEDSEVZETÍCH TAJEMNÍKA ČES -
KDY BUDOU ČLENSKÉ LEGITIMACE -
TA NEŠŤASTNÁ KANCELÁŘ? -

Jenom se ohlédl, poněkud nevrle a podrážděně, a v očích měl napsáno, že nemá čas. Pavel Polnický, absolvent SZTŠ, uspěchaný sedmadvacetiletý tajemník Českého esperantského svazu to nemá v nové funkci zrovna lehké. Má tu smůlu, že je tajemníkem organizace ožívající znovu po dlouhých letech. Velká část starostí s tím spojených padá na jeho hlavu, a čtyřletá zkušenost s esperantem někdy nedostačuje. Snad se uleví jemu i nám, svěří-li se Startu se svými starostmi.

Pavle, měl jsi nějaké předsevzetí, když jsi nastupoval jako tajemník ČES?

Předsevzetí... to je moc prima věc. Mám-li být upřímný, musím přiznat, že jsem měl těch předsevzetí dokonce víc. Jen některá z nich: mít vlastní sekretariát, tak, aby byl naší chloubou, vlastní chatu zařízenou pro naše členy i zahraniční hosty... jednou snad i esperantskou cestovní kancelář. Ale fantazie je lehká múza; dnes při zjištění, že pouhé vytištění 2 000 kusů poštovních poukázek trvá pět měsíců, mám i na svá předsevzetí poněkud jiný názor.

A teď vážně. Od brněnského sjezdu uplynulo již půl roku. Můžeš odpovědně říci, kdy objevíme ve své poště svazové legitimace?

Legitimace by byly, ale nejsou vyplněné. A kdo je vyplní? Prakticky jsem na to zůstal sám s Drahuškou Zdvihalovou. Ono je to těžké, mládež, která vždy ochotně pomohla, má sice chuť i zájem, ale vzhledem ke studiu nemá to hlavní... čas. Přesto ale věřím, že se nějaká ta chvilka mezi studiem najde. Potřebovali bychom co nejrychleji schopnou esperantistku jako sekretářku. A navíc vlastní svazové místnosti.

Dosavadní výsledky pátrání?

Myslíš kancelář? Měli jsme několik typů, jeden se zdál být reálný, ale opět nic... Snažíme se, hledáme styky a známosti, ale zatím bez výsledků.

Není to konstatování právě nadějné. Raději mi pověz, kolik už máme členů...?

Když už jsi začal o přihláškách, dovol několik poznámek na adresu kroužků i jednotlivců. Domnívám se, že na přihlášce jsou jednotlivé rubriky proto, aby je dotyčný zájemce o členství vyplnil. Považoval jsem to za samozřejmé, ale nyní při vyplňování legitimací vidím, jak mnoho údajů chybí. Chtěl bych proto požádat všechny, kteří dostali nebo ještě dostanou žádost o doplnění, aby tak učinili opravdu urychleně. Mám také buď přihlášky bez zaplacených příspěvků anebo jen peníze bez přihlášek. Velmi nás to zdržuje a musíme psát zbytečné dopisy. A konečně se dostávám k tvé otázce. Odpověď najdeš ty i čtenáři na poslední stránce Starta.

To jsou mi radosti. Jsi vůbec, přes všechny ty svízele, spokojen s funkcí?

Jsem v podstatě optimista. A spokojenost s funkcí? Těžká odpověď za dané situace. Ale snad mi ke spokojenosti přispělo i splnění mého velkého přání, podívat se do Skandinávie. Navštívil jsem UK ve Finsku a podíval jsem se i do Švédska. Přivezl jsem si kromě mnoha zážitků také barevný 8mm film vlastní výroby a pokud by měli v kroužcích zájem, jsme k dispozici já i film - stačí napsat.

## Kroužky hlásí

BRNO Program EK na listopad a prosinec (začátky v 19.30 hod.): 4. 11. Návštěvou v přátelském Rumunsku (M. Lorková; 11. 11. Hlasatel svobody F. J. Schiller (T. Bor'ovec); 18. 11. Jak jsem viděl Švédsko (Z. Hršel); 25. 11. Divadelní večer (režie M. Adamcová); 2. 12. Kongres v Helsinkách (V. Kříž); 9. 12. Společenský večer a filmy v esperantu; 13. 12. Koncert na počest 110. výročí narození L. L. Zamenhofa (prof. V. Scheiber).

PODĚBRADY Od 4. dubna zde existuje další železničářský esperantský klub v Československu. Díky porozumění představitelů odborů může klub, čítající patnáct členů pod vedením F. Pytlouna, užívat bezplatně místnosti a veškerého kulturního zařízení.

Poděbradští esperantisté zvou k návštěvě svých městských parků a doufají, že mnohé své přátele budou moci uvítat při příležitosti 10. jubilejního setkání ve dnech 4. - 12. července 1970, které se bude konat pod záštitou místních a okresních činitelů a kulturních a sportovních institucí.

PRAHA Dva kursy esperanta pro začátečníky probíhají od začátku října v hlavním městě: audiovizuální metodou INTER vyučuje A. Slanina na ZDŠ v Sázavské ulici a prof. Dr. R. Horský na Husově fakultě.

VSETÍN EK při Klubu pracujících ROH pořádá od 22. září v Lidovém domě konverzační kursy mezinárodního jazyka: pro začátečníky a pro pokročilé.

MĚLNÍK Kroužek esperantistů při ZDŠ Mělník, Jungmannovy sady, uspořádal 18. října III. setkání esperantistů středočeského a severočeského kraje. Mezi 120 účastníky byli i hosté z Moravy a Slovenska.

BUČOVICE Esperantský kroužek zahájil podzimní činnost kursem esperanta pro začátečníky. Kurs vede Dr. Nekuda, počet kursistů 12.

---

ZE SLOVENSKA. Přátelské setkání esperantistů při příležitosti 25. výročí Slovenského národního povstání uspořádal ve dnech 27. - 28. září Poradní sbor pro esperanto při kabinetu Osvětového ústavu v Banské Bystrici a Okresní osvětový dům v Banské Bystrici. Na pořadu setkání byla pracovní konference, kulturní program a prohlídka města spojená s návštěvou památníku SNP.

POR PARTOPRENONTOJ DE IFES. Kiu ŝatos post IFES (skisemajno 1970) partopreni ekskurson al Škoda-uzinoj kaj al la mondkonata bierfarejo en Plzeň kun dutaga programo, sciigu on aliĝilo, kian specon de loĝigo li deziras (private, en hotelo). Ekskurso al Plzeň ne estas enkalkulita en la prezon de IFES. Aliĝoj: L. Kovář, SD VŠD, Hliny bl. VIII/403 B, Žilina. Aliĝfino 30. 11. 1969.

D-ro Ľudovít I z á k 70-jara

La konata slovaka esperantisto d-ro Ľudovít Izák ĝisvivis la 9-an de oktobro 70 jarojn.

Li naskiĝis en Budapeŝto kaj post studoj en Praha kaj praktikado en sanatorioj li fariĝis distrikta ftizologo en Martin. Esperantisto li iĝis en 1947. Li propagandis Esperanton en la revuo Krásy Slovenska de li redaktita, aktivis en ĉiu organiza kaj literatura entrepreno de la slovakia movado, redaktis "Esperantisto Slovaka" (renovigita nunjare sub lia redaktado), "Esperanto en Slovakio" kaj "Informoj de Ĉehoslovaka Esperanto-Komitato" kaj laboris kiel membro de tiu komitato.

Ni deziras al la jubileanta d-ro Izák daŭre teni la bonan humoron kaj viglecon, por la propra kontento kaj ankaŭ por prospero de la Movado.

-jm-

--------------...oooOOOooo...-------------...oooOOOooo...---------------

Josef V o n d r o u š e k 65-jara

La 1-an de decembro 1969 atingis 65 jarojn de sia aĝo s-ano Josef Vondroušek en Brno, bankoficisto e. p. Li esperantiĝis en 1923 kaj aktivis kiel sekretario de Esperantista Klubo en Brno, kies prezidanto li estas ekde 1945. Li gvidis dekojn da kursoj, laboris kiel delegito de UEA kaj komitatano de EA ČSR kaj nun de ĈEA, organizis jam tri landajn kongresojn en Brno (1935, 1950, 1969).

Li tradukis "Libro de Apokrifoj" de Karel Čapek, "Saturnin" de Zdeněk Jirotka kaj aliajn.

-jm-

--------------...oooOOOooo...-------------...oooOOOooo...---------------

N o v a ĵ o j e l I O E

La 3-a Laborkonferenco de IOE en Primoŝteno okazis de la 10-a ĝis la 16-a de aŭgusto. Partoprenis ĝin 82 personoj el 12 landoj. La konferenco decidis plivastigi la agadon sur la kampo de turismo, kulturaj aktivadoj kaj internaciaj kongresoj kaj konferencoj.

"ESTO" sukcese rondvojaĝis. La unua vojaĝo organizita de la novefondita entrepreno "Esperanto-Turismo" (ESTO) estis rondvojaĝo tra Skandinavio, nomata "Noktomeza Suno". La celo de ESTO estas organizi konstantajn "karuselajn" rondvojaĝojn por iom post iom devigi hotelistojn, kelnerojn k. a. lerni Esperanton. Kun 22 partoprenantoj el Jugoslavio, Italujo, kaj Germanujo la aŭtobuso el Beogrado atingis Hanovron, Kopenhagon, poste Oslon kaj Hamerfeston, la plej nordan urbon de la mondo. Ĉe la Nordkabo, la plej norda punkto de Eŭropo oni ĝuis plenan noktomezan sunon. Sekvis renkontoj kun laponoj kaj iliaj boacoj. Post Helsinki, Turku kaj Stokholmo, la kastelo Kronborg kun la spirito de Hamleto... Kvankam la organizantoj rekte kontaktis kun ĉiuj hoteloj se eble en Esperanto, la amikaj renkontoj kun esperantistoj aldonis novan ĉarmon al tiu ĉi vojaĝo. Kuraĝigita per tiu ĉi sukceso, ESTO planas ripeti la saman vojaĝon tri fojojn dum la somero 1970.

KOMUNA KONGRESO DE KRISTANAJ KAJ KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ

okazos 24/7 - 29/7 1970 en Brno. Decidis pri tio komuna komitata kunveno de ĈLA-sekcioj de kristanaj kaj de katolikaj Esperantistoj en Brno, okazinta la 8-an de novembro en Brno. Ĉeestis ankaŭ la reprezentantoj de Muzeo en Přerov, kiu en la sama tempo arangôs sian Esperantistan konferencon pri J. A. COMENIUS okaze de la 300-jara datreveno de lia forpaso. Ĉeestis ankaŭ du reprezentantoj de slovakaj Esperantistoj.

La kunveno fiksis la programon de la kongreso, en kies kadro okazos ankaŭ renkontiĝo de IKUE kaj KELI-anoj el eksterlando. La komuna malfermo estos en la preĝejo de Církev bratrská (La Frata Eklezio) en Brno, Lenin-strato, ekumena diservo en la preĝejo de la Ĉeĥoslovaka Eklezio en Brno, Botanická-strato kaj la fermo en iu el la romkatolikaj preĝejoj. La centraj temoj de la labor-kunsidoj estos du: Kristo - la Lumo de la Mondo, kaj La Pacaj Klopodoj de J. A. Comenius. En la kadro de la kongreso la kongresanoj vizitos Uherský Brod kaj ties Muzeon kaj aliajn rememoraĵojn pri Comenius, kaj partoprenos prelegon Comenius kaj la Ideo de la Internacia Lingvo. La programon en Uherský Brod arangôs Muzeo de Přerov. En la tagoj 30 - 31/7 1970 la kongresanoj ĝuos programon preparitan de slovakaj Esperantistoj, kiuj arangôs viziton al Tatra-montaro kaj ĉeestos Antaŭkongreson en Bratislava. La detalojn prilaboros Loka Kongresa Komitato konsistanta el ok personoj.

Ni ne forgesos ĝustatempe informi la legantaron de Starto pri la detaloj kaj aliĝoj al la kongreso.

PETO AL MIA KARA KORESPONDANTO

Eble vi ankaŭ ricevis tian ĉi leteron de via sveda amiko. Ĉar ĝi estas sufiĉe grava, ni represas ĝin.

"Mi scias, ke en granda parto de la mondo oni kun intereso sekvas la evoluon en Svedio. Kelkfoje oni laŭdas la landon kaj popolon, alifoje oni fakte kondamnas nian popolon, precipe la junularon, pro t. n. libera moralo. Jes, la opinioj estas diversaj kaj la konkludoj aŭ pozitivaj aŭ negativaj.

Sed nun temas pri Esperanto kaj uzado de la lingvo por konigi faktojn pri Svedio per la radio. Momente la fako de "Programoj por eksterlando" de la sveda radio elsendas en ses fremdaj lingvoj: angla, rusa, franca, germana, hispana kaj portugala. Antaŭ proksimume 20 jaroj nia radio ankaŭ regule uzis Esperanton, sed nun ne plu.

Estas tempo enkonduki Esperanton en la svedan radion, kiu cetere estas bone aŭdebla en la mondo ekster la svedaj limoj. Nun mi petas vian helpon! Mi insiste petas vin skribi al sveda radio, proponante la enkondukon de Esperanto en la programojn por eksterlando.

Skribu al la malsupre notita adreso, petante kaj proponante, ke Radio de Svedio ankaŭ uzu Esperanton.

Skribu baldaŭ, des pli certa estos bona rezulto!

Adreso: Radio Svedio, Eksterlanda Programo, STOCKHOLM, Svedio."

Bonvolu helpi, estontece ni eble bezonos saman helpon de svedaj samideanoj!?

-P-

ANONIMAJ FAKULOJ...?

"En Esperantujo estas normala afero, ke ekzemple ĉarpentisto sin deklaru fakulo pri politiko (vidu UEA-jarlibro 1968, p. 341), oksoficisto okupiĝu pri terkulturo (p. 206) aŭ iu ajn pri io ajn alia", skribas s-ano T. Sekelj en Esperanto-Gazeto n-ro 31. "Tio ja signifas," daŭrigas la aŭtoro "konstantan nefakan laboron kaj nefakajn rezultojn unuflanke kaj grandan perdon de fakaj konoj... Sen fortostreĉo, iu ajn el ni povus citi komerciston, kiu instruas... ŝuiston, kiu propagandas, konduktoron, kiu redaktas... funkcioj, pri kies praktikado en sia nacilingva medio ili estus proklamitaj malkapablaj, aŭ eĉ ne kuraĝus revi..."

. - . - .

Rim. de red.: kaj ni devas kredi, ke multaj profesioj enskribitaj en la Jarlibro simple ne ekzistas, ĉar ekzemple se tramisto sin proklamas filma producento (1969, p. 177) sen indiki tiun ĉi efektivan fakon, oni trovas rezulte sub koncernaj nomo kaj adreso nur profesian anonimon!

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

...Plejparte la esperantistoj uzas Esperanton... por kolekti fotojn de siaj gekorespondantoj, interŝanĝi p. m. kaj il. pk., ktp. Kaj tiuj ĉi esperantistoj precipe estas tre mirigitaj, ke iliaj registaroj ankoraŭ ne akceptis kaj ne aplikis Esperanton... Unue ni esperantistoj devas el nia propra forto firmigi nian movadon. Tion ni atingos nur tiam, kiam ni praktike uzos Esperanton... Ni fariĝu perantoj de interrilatoj de diversnaciaj organizoj kaj grupoj. Ni skribu raportojn pri la vivo en nia lando por eksterlandaj gazetoj kaj male por la niaj. Ni aranĝu ekspozicioj... Kolektu la pruvojn pri tiu ĉi laboro kaj montru ilin al skeptikuloj. Baldaŭ vi vidos la rezultojn...

Rudolf Burda
en ESPERANTISTA, 20. 2. 1951

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

Projekto por la nova traduko de Biblio en Esperanton estas unu el la originaj celoj de la Internacia Asocio de Bibliistoj kaj Orientalistoj (IABO). Informojn bonvolu peti de D-ro Angelo Duranti, prezidanto de IABO, Piazza Duomo 4, 48100 R a v e n n a, ITALIO

...oooOOOooo...

Funkciulo de KELI en Anglujo. Pastro Jaroslav Adamec, sekretario de ĉeĥa sekcio de KELI kaj sekretario de E-klubo en Litomyŝl, vizite en Anglujo je la invito de Esperanto-klubo en Bournemouth, aranĝis la 3-an de septembro "Ĉeĥoslovakan vesperon" kun koloraj lumbildoj kaj vigla diskuto post la prelego. La 7-an de septembro li gvidis en la sama urbo diservon en Esperanto.

Kun celo ligi kontaktojn kun esperantistaj ĵurnalistoj kaj redaktoroj de Esperantaj gazetoj la redakcio de STARTO ofertas al ili diversajn praktikajn servojn dum ilia eventuala restado en Praha: akompanon, prizorgon de tranokto, kontaktigon kun publikaj institucioj ks.

...oooOOOooo...

Esperantujo en Bildoj - Internacia foto-konkurso - Ni invitas al la partopreno ĉiujn fotoamatorojn kaj petas ilin sendi fotojn pri nia movado en la formato 9x12 cm. Kiel akompanan tekston ni volonte akceptus artikolojn ĝis 20 tajpitaj linioj. La sendaĵon oni garnu per belaj poŝtmarkoj kaj E-glumarkoj kaj direktu ĝin al: ESPERANTO "FO-KI/MA", poŝtfako 16, P. O. 119, BUDAPEST, HUNGARIO.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## Leslie R. Stilling - MARIA TEREZA

Jam doloriĝis mia kor',
kiam en malfeliĉa hor'
mizer' alproksimiĝis.
Kaj moke, moke jam la sort'
turmentis min ĝis la fort'
rapide malpliiĝis.
Sed jen! Alvenis anĝelin'
vojaĝis ŝi per flugmaŝin.

Rekantaĵo:

Maria-Tereza en mia koro ja
restos sen fin'
Maria-Tereza, eta ĉarma, kara
anĝelin'.

Forflugis de mi la mizer'
kaj ĝeno pri la vivafer' -
La koro trankviliĝis -
ĉar anĝelin prizorgis min:
por mi ŝi iĝis flegistin' -
Tial mi resaniĝis.
Foriris ĝen' - forpasis laĉ'
kaj ĉe la kor' ekregis pac' -

(Rekantaĵo)

Ho, kara Eva el eden' -
ĉiela estis la haven' -
en kiu mi troviĝis.
Sed ĉiam sub la firmament'
malfeliĉego aŭ serpent'
subtile ja eniĝis:
eĉ en eden' ekzistas kriz'
kaj renversiĝas paradiz'

(Rekantaĵo)

Ho anĝelin' - vi estas for
post via kara amlabor' -
Sed ne, mi ne plu ploras.
Mi daŭre dankos, jes, sen fin'
kaj pensas pri la anĝelin' -
ĉar ŝin mi ja adoras...
Ho, kara Eva el eden' -
vi ĉiam restu en ĝarden'

(Rekantaĵo)

\- - -

Al Maria-Tereza Bourbeau kaj Sláva Beníček dediĉis la aŭtoro.

\- - -

La baladon pri kanadanino Maria-Tereza kiu ofereme alvojaĝis por flegi min, aŭdinte, ke mi estas koratakita, verkis kaj surbendigis mia amiko, anglo Leslie. Tiom por klarigi la devenon de la verko. V. Beníček

=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=

CO NEVÍTE O ESPERANTU? Základní údaje o historii, organizaci a aplikaci mezinárodního jazyka, včetně krátkého přehledu gramatiky a dějin čs. esp. hnutí, obsahuje brožura O. Kníchala, vydaná vloni OÚ v Praze. Je nepostradatelnou příručkou při práci v esperantských kroužcích a kursech esperanta. Nabízí zdroj základních vědomostí pro všechny zájemce. Pamatujte na tuto možnost právě nyní, v podzimním období. Publikace je ještě k dostání ve větším množství a za pouhé 4 Kčs na sekretariátu ČES, Francouzská 22, Praha 2. Objednávejte hromadně, ET nejméně po 5 výtiscích.

FILMA kaj DIAPOZITIVA SERVO de UEA
serĉas esperantist(in)on, kiu profesie aŭ amatore interesiĝas pri filmado kaj diafotado, kaj kiu ŝatus respondece transpreni la komision de la Estraro de UEA pri la filma kaj diapozitiva servoj. Bona lingvoscio de Esperanto postulata. Detalojn petu ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, R o t t e r d a m - 2, NEDERLANDO.

Stav členů ČES podle jednotlivých kroužků ke dni 25. 11. 1969

Praha - 179, Ostrava (VŽKG) - 62, Brno (ROH) - 60, Třebíč - 60, České Budějovice - 46, Mělník - 45, Vsetín - 37, Plzeň - 34, Třinec - 34, Teplice - 31, Pardubice - 30, Gottwaldov - 29, Tábor - 29, Liberec - 28, Žďár nad Sázavou - 28, Ústí nad Labem - 27, Ostrava-Poruba - 25, Polička - 25, Písek - 23, Česká Třebová - 21, Hradec Králové - 20, Litoměřice (CMBF) - 20, Olomouc (ROH) - 20, Opava - 19, Hranice - 18, Znojmo - 17, Jihlava (ZK) - 16, Havlíčkův Brod - 15, Hořice - 14, Kolín - 14, Jihlava (DK) - 13, Havířov - 12, Herbortice - 12, Paskov - 12, Brno (I. B.) - 11, Stonava - 11, Svitavy - 11, Frýdlant v Čechách - 10, Lanškroun - 10, Moravské Budějovice - 10, Ostrava (žel.) - 10, Poděbrady - 10, Příbor - 10, Karlovy Vary - 9, Vyškov - 9, Kladno - 8, Místek (Slezan) - 8, Žamberk - 8, Jaroměř - 7, Městec Králové - 7, Česká Lípa - 6, Česká Třebová (SPŠŽ) - 6, Český Dub - 6, Most - 6, Semily - 6, Trutnov - 6, Choceň - 5, Hodonín - 5, Louky nad Olší - 5, Příbram - 5, Šumperk - 5.

CELKEM 1 351 členů, tzn. dalších 291 za poslední dva měsíce.

.:!:.:!:.:!:.

KORESPONDI DEZIRAS

La redakcio akceptas senpage individuajn kaj kolektivajn korespondanoncojn, ks. el eksterlando. Bv. indiki la aĝon, profesion, interesojn. Represo dezirata.

---

Socialistaj brigadoj de la plej granda radio kaj televido-entrepreno en Hungarujo "ORION", Budapest 10, pf. 84 kun samfakaj brigadoj kaj personoj el Ĉeĥoslovakio:

LUNA 68 - kun 45 laboristoj. Gvidantino: Valéria BELLONI. Mikro 43 klaso;

BÉKE (paco) kun 48 gelaboristoj. F-ino Erzsébet HUNTI, Mikro 42 klaso;

VÖRÖSMARTY kun 43 gejunuloj (multaj akvariistoj). F-ino Éva PAPP. Mikro 42 klaso. Ili estas teknikistoj-inĝenieroj kaj oficistoj.

Virina brigado Éva BRAUN - 10 ĉarmaj virinoj 18-20 jaraj, kalkulistinoj en la centra oficejo por la programo de la televidaparatoj. F-ino Anika KISS, Útókalkulácios Oszt.

Brigado TELSTAR, gvid. Árpád G. PÖLÖSKEY, Mikro 43 klaso. Oficejo por teknika labor-direktado (kun 30 inĝenieroj-teknikistoj).

. - o - O - o - .

ĈU VI SCIAS, ke "Sveda Instituto por kultura interŝanĝo kun eksterlando" eldonis novajn informilojn sub la titolo "Faktoj pri Svedio"? La presaĵoj estas riceveblaj por eksterlandanoj post rekta peto. Skribu al: Sveda Instituto, Box 7072, 103 82 Stockholm, SVEDIO

x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x-x

Ke ĝi fariĝu lerninda lingvo.....

Pli kaj pli oni devus vidi sur pordoj de diversaj entreprenoj la indikon: "Esperanto parolata". Universala Revuo indas vian subtenon, ĉar ĝi senpage publikigus anoncon pri via asocio (klubo, grupo, rondo ktp.) en la ADRESARO de la lokoj, kie oni povas praktike uzi Esperanton:

A-hoteloj, restoracioj, magazenoj, butikoj, informejoj, E-asocioj (simpla anonco senpaga);

B-aliaj entreprenoj, kies estro aŭ almenaŭ unu oficisto parolas Esperanton (anonco: 0,06 stelo por ĉiu litero);

Abono de UR: s-ano M. Rétot, 11 Bd. Davout, 75-Paris, FRANCIO

Abonkotizo: 20 steloj, 10 irk. aŭ 7 Ffrs.

STARTO - oficiala organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio = redaktas: D-ro Josef Kavka, Jaroslav Mařík, inĝ. František Sviták, Ivo Železný - respondeca redaktoro: Oldřich Kníchal
Adreso: Blanická 4, Praha 2

LA TEMPOJ ŜANĜIĜAS

Hazarde okazis, ke ĉijare jam ĉiuj prahaj membroj de JS-estraro estas studentoj. Fakto ĝojiga, sed sekve ne restas tempo por sekurigi pluan aperadon de Starto. CEA-estraro jam esploris eblecojn de presado kaj la traktadoj kun presejo estos espereble sukcesaj. Junularaj Paĝoj aperados plu laŭ niaj temp-eblecoj nur por JS-membraro. Ĝis!

---

IOM MALFRUE, SED TAMEN

ni sincere deziras ĉion bonan al novedziĝintaj

JAROSLAVA FIŠEROVÁ kaj PETR CHRDLE,
kiuj geedziĝis la 16-an de oktobro 1969 en Hořovice

kaj al

MARIE PEŠINOVÁ kaj WILFRIED KUTZER,
kiuj geedziĝis la 25-an de oktobro 1969 en Litomyšl.

---

KORESPONDI DEZIRAS...

-17-jara japana lernanto de gimnazio kolektanta bildkartojn deziras ricevi kolorajn ilustritajn poŝtkartojn el Ĉeĥoslovakio. Skribu al s-ro Horiguchi Yasuhiro, Tojin 8-8, Hukuoka -si, JAPANIO.
-Simpatia 26-jara rumana fraŭlo - ekonomikisto, deziras korespondi kun ĉeĥaj gejunuloj. Aron Laczko, Curtea 21/3, Tg. Secuesc, RUMANIO.
-Du ĉarmaj japaninoj deziras korespondi kun ĉeĥaj gejunuloj. F-ino Isii Setuko, c/o Nisiyori, Susaki-tyo 5-1, Hukuoka-si, JAPANIO (18-jara, interesiĝas pri legado kaj filmo), kaj f-ino Kagawa Yasuko, Misumi-tyo 566, Maedasi, Hukuoka-si (17 jara, interesiĝas pri muziko).
-Juna esperantisto lernanta indonezian lingvon serĉas indoneziajn samideanojn, aŭ samideanojn interesiĝantajn pri la indonezia lingvo. Ĉiuj antaŭaj provoj estis senrezultaj. Se iu el niaj amikoj, precipe eksterlande, povas helpi, bonvolu skribi al s-ro Miloslav Vlach, Ubikace IV, Štětí, (Litoměřice), ĈEĤIO, ĈEĤOSLOVAKIO.
-18-jara estona bibliotekisto deziras korespondi kun eksterenropaj landoj esperante, angle, germane. Skribu al Ants Mikk, Jakobsoni 3-2, Viljandi, ESTONIO. Li interŝanĝas grandformatajn kolorajn poŝtkartojn.
-Anoj de Viljandia E-klubo deziras korespondi kun la tuta mondo. Viljandia E-klubo, P. k. 33, Sidesölm, Viljandi, ESTONIO.
-Gejunuloj (ĝis 30-jaraj) el Bulgara E-klubo deziras korespondi kun komencantoj. Esperanta klubo (jun. aferoj), P. k. 184, Plovdiv, BULGARIO.

HEROLDO DE ESPERANTO

Ĉar la kvorumo por Ĉeĥoslovakio estis ĉijare iom altigita, eblas akcepti pluajn 10 novajn abonantojn. Abonkotizo faras kiel kutime 55,-- jare. Ĝi estas nun dissendata rekte el Belgio.

ANONCETOJ EN HEROLDO

Denove eblas publikigi anoncetojn en Heroldo, la plej disvastigita internacia E-gazeto. Anonceto ĝis 25 vortoj kostas 25,--, ĝis 50 vortoj 50,--.

FABELOJ de H. CH. ANDERSEN tradukitaj de L. L. ZAMENHOF

eldonitaj de Heroldo, volumoj I kaj IV estos en malgranda kvanto aĉeteblaj por kronoj. Ambaŭ libroj havas kolorajn kovrilojn, po ĉ. 250 paĝoj kaj po 50 originalaj ilustraĵoj, parte tutpaĝaj. Provizora vendprezo estas 45,-- po volume.

LA JUNA PENSO

pure esperantlingva internacia gazeto aperanta en Francio - oficiala organo de SAT-junulfako, unu el la plej interesaj gazetoj aperantaj en Esperantujo.

LJP aperas nur dank' al la kotizoj de siaj abonantoj, ĝin subvencias neniu organizo
LJP estas verkata de la abonantaro mem, ĉiu rajtas libere esprimi sian opinion, neniu temo estas tabuo, cenzuro ne ekzistas
LJP aperas bele stencilita akurate ĉiun duan monaton; ĉiujare aperas kromkajero senpaga por la abonantoj
LJP estas taŭga materialo por diskutoj dum klubaj kunvenoj kaj por E-kursoj
LJP servas al izoluloj: ĉiun duan monaton venas nova numero liganta ilin kun esperantistoj el foraj landoj
LJP estas malmultekosta, por unu jaro (6 kajeroj kaj 1 kromkajero) nur 18,--; por du jaroj samtempe pagitaj vi ĝuos rabaton pagante 27,--. La gazeton vi ricevados rekte el Francio.

PACON EN VJETNAMIO

16-paĝa ofsetita bulteno aperanta minimume kvarfoje jare informas ne nur pri Vjetnamio, sed ankaŭ pri Okinawa kaj aliaj centroj de grandpotenca potencprezento. Abonkotizo 7,-- jare, dissendata rekte el Japanio.

KVINPINTO

organo de Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo, dum lastaj jaroj ĉiam pli interesa junulara E-gazeto konata ne nur en Svedio sed ankaŭ en la okcidenta Eŭropo. Nuntempe ni traktas kun SEJU pri ebleco peri abonon de Kvinpinto por ĉeĥaj esperantistoj. Provizora kotizo por 4 kajeroj jare estas 12,--.

INFORMOS: Ivo Železný, Vrchlického 41/493, K o š í ř e, Praha 5, ĈEĤIO